

Ora Ĵurnalo

Numero 56, Novembro 2022



La Ĝenerala konsulejo de Ĉinio en Gotenburgo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Nuba tago en Hisingen, Gotenburgo	14
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Kosmosgården, Martinus Center, Varnhem	15
Espeporko meditas.....	3	Hilma af Klint.....	18
La Ĝenerala Konsulejo de Ĉinio en Gotenburgo	3	Pioniraj virinoj (daŭrigo)	18
La ĉina palaco en Lovön	4	El japana montrofenestro.....	20
Du Fu, poeto en la malnova Ĉinio	5	Klubo en Japanio kaj klubo en Gotenburgo legas la saman libron.....	21
Libro de Laŭzi	6	La UN-tago estas festata la 24-an de oktobro	21
Saĝaj diroj de Laocio, ĉina filozofa	6	Verda energio kontraŭ homaj rajtoj en okupita Okcidenta Saharo.....	22
El Ĉinio Vejdo ĉiun monaton publikigas poemojn el la tuta mondo.....	7	Nia kongola amiko Espoir gvidos retkurson	23
El Popola Ĉinio.....	7	Leteroj al redakcioj en Gotenburgo kaj Stokholmo.....	23
Saniga gimnastiko de Shen Junru de YANG SHENG.....	7	Titti Hagström el Stokholmo sendis ĉi tiun tekston al Ora Ĵurnalo, trovita en la gazeto "Vi i Vasastan"	24
Kial malbone esti maldiligenta?	8	Repliko 4 novembro de nia letero al la redaktoro 22 oktobro	25
Libropropono de Ingegerd Granat	8	Förslag till inköp av esperantoböcker till bibliotek	26
La librofoiro 2022 en Gotenburgo	9	Roberto Poort estas la administranto de E-librejo en Facebook	30
La Sabata grupo havas librorondon pri la libro Katrina malfruas de Sten Johansson....	10	La strato de Tanja, Vivo en Rusio 1917–2017	33
"Hej! Hej!" al Häcken en Hisingen	11	Isaac Asimov, rus-usona verkisto, parto 2... 33	
La 6an de novembro oni manĝas tortetojn .11		Respondoj al nia demando al la legantoj de Ora Ĵurnalo.....	36
Esperanta prelego en Angered la 11an de oktobro	11		
Skandinava Muzika Renkontiĝo	12		
Beslōjad sol livgivande stjärna – Vualita suno viviga stelo.....	13		
Atentu, eta arvikolo!	14		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.





Espeporoko meditas



頁 Ĉu indas sendi leterojn al gazetaj redaktoroj? Jes, nun ni scias ke indas. La urba biblioteko de Gotenburgo ĵus petis nin sendi liston de aĉetindaj novaj esperantolibroj. Ni ĝojas!!!

頁 Ŝajnas ke Ĉinio nun estas en la fokuso. Ingegerd ja faradas bildojn de Gotenburgo kaj ĉi tiun fojon la Ĝenerala konsulejo de Ĉinio kaptis ŝian atenton. Dekstre: simbolo por Ĉinio – la pando.

頁 Ne estas facile havigi al si esperantan flagon. En UK-oj eblas, sed retserĉo povas gvidi vin al entrepreno, kiu produktas nekutimajn esperanto-flagojn.

頁 Scienca fikcio verŝajne estas tre populara. Ĉu okazas ke la vizioj de ties verkistoj fariĝos realaj? Ni ja nun havas perspektivon, ĉar sciencaj fikciaj libroj nun troviĝas dum longa tempo.

頁 Ĝoje ke japana klubo diskutas la saman legorondan libron, kiel ni faras dum esperanto-sabatoj en Gotenburgo – *Katrina malfruas* de Sten Johansson.

頁 Estas aventuro iri al semajnfina renkonto, kie oni diskutas la sencon de la vivo. 28 por mi antaŭe nekonataj homoj troviĝis en Kosmos-gården. La Tria Testamento de la dano Martinus (Thomsen) donas novajn perspektivojn. Oni ne povas membriĝi en iun Martinus-Societo, ĉar Martinus pli preferis individuan pensadon ol "kolektivan pensadon".

頁 La 19an de novembro la gotenburga e-klubo planas festi la 5an naskiĝtagon de Ora Ĵurnalo. Ni luos mojosan malnovan domon – Hökälla. Estos distraĵo, muziko, loterio – kaj manĝaĵo. Kiel enirbileto ĉiu kunportu etan fromaĝon! Bonvenon je la dua posttagmeze! Ĉu vi pensas ke Ora Ĵurnalo vivos por ankaŭ celebri sian 10-jaran datrevenon? Neniu scias. /Siv

La Ĝenerala Konsulejo de Ĉinio en Gotenburgo

Ĉinio volas translokigi sian tro malgrandan luitan lokalon ĉe Grönsakstorget al propra memposeda lokalo ĉe Sankt Sigfridsplan, en Örgryte, najbare al la rusa konsulejo.

Kiam la sveda PEN donis la Tucholsky-premion al la svedĉina verkisto Gui Minhai, la streĉeco inter Svedio kaj Ĉinio kreskis. La premio estas disdonita ĉiun jaron al



Estis manifestacioj kontraŭ la "Reedukadaj kampoj" en Ĉinio. Ĉefe la uiguroj suferis.

persekutata, minacata aŭ ekzilita verkisto aŭ publicisto. La ĉina ambasadoro minacis:



– *Estos konsekvencoj!* Gui Minhai ekde 2015 troviĝas en ĉina malliberejo sen juĝoproceso.

Gravas, ke oni ne kulpigas ĉinojn en Svedio pro la agoj de ilia iama hejmlando. /Siv

Estis ankaŭ manifestacio kontraŭ la traktado de hundoj en Ĉinio.

La ĉina palaco en Lovön

de Ingegerd Granat

Reĝo Adolf Fredrik, jes vi scias, li kun la fastobulkoj, la nommarko kaj la tornitaj snuftabakuj, decidis doni naskiĝtagan donacon al sia reĝino Lovisa Ulrika. En 1753 li konstruis lignan pavilonon, kiu post kelkaj jaroj, en 1769, estis anstataŭigita per la nuna Ĉina Palaco kiu estis konstruita sur la terposedaĵo de Drottningholm sur insulo Lovön en Mälaren.

La tiama arkitekto Adelcrantz respondecis pri la ekstera formo kaj Jean Eric Rehn formis la internojn. Ĝi fariĝis ĉina naskiĝtaga donaco en franca



rokoko. La ĉefkonstruaĵo estis plenumita per du etaĝoj kun kurbaj koridoroj, du malaltaj pavilonoj kaj la malgranda ĝardeno fariĝis vera kultura trezoro, kie la imago, tiam kaj nun, povas vivi libere, en vera fabela kastelo kun drakoj kaj palmtrunkoj. Vizitu ĝin se vi preterpasos!

La Blua Salono estis utiligita en la 18-a jarcento kiel manĝejo kaj festohalo kaj nun estas elmontrita por vizitantoj.

La varma rozkolora tiel nomita "Kudrita Ĉambro" ĉe Kina Slott havas murpanelojn, kiuj laŭdire estis broditaj de la reĝino Lovisa Ulrika kaj ŝiaj korteganinoj, diras princino Christina sinjorino Magnusson en la libro "Dagar på Drottningholm" (Tagoj en Drottningholm).



Du Fu, poeto en la malnova Ĉinio

de Ingegerd Granat



Ankaŭ konata kiel Din Fu, tiu poeto estas unu el la grandaj klasikistoj de la ĉina literaturo. Fakte, li estas konsiderata "Sankta Poeto". Mi elektis la poemon "Vintra Tagiĝo" ĉi-sube.

Du Fu

Naskita en 712, li baldaŭ montris lernemon kaj talenton pri pentrado, muziko kaj rajdado. En sia junaĝo, li volis vivi boheman vivon, li vojaĝis tra tuta Ĉinio dum ties plej prospera tempo, la dinastio Tang.

Du Fu pripensas sian vivon en pluraj poemoj. Li havis grandan amikecon kun aliaj poetoj kaj

kiel ekzemplon ni povas mencii Li Po. Li ankaŭ portis amon por sia familio kaj kompaton por la malriĉeco de la grandurbo.

La lastaj jaroj de lia vivo estis pasigitaj en tre nesufiĉaj kondiĉoj kaj li estis finance subtenita de amikoj. Kaj kvankam li ne sukcesis akiri rekonon en sia vivo, lia prestiĝo kaj famo pliiĝis post lia morto.

Li estis tre fekunda kaj lasis heredaĵon de pli ol 1 400 poemoj, unu el kiuj ni povas legi ĉi-sube:

Vintra tagiĝo

Homoj kaj bestoj de la zodiako
Venas denove kontraŭ ni.
Verdaj vinboteloj, ruĝaj omarŝeloj,
Ĉiuj malplenaj, dise sur la tablo.
"Kiel mi forgesu malnovan konaton?"
Ĉiu sidas kaj aŭskultas siajn proprajn pensojn.
Ekstere kriegis vagonaj radoj.
La birdoj vekigis tegmentrande.
En alia vintra tagiĝo baldaŭ
Mi devos alfronti miajn kvardek jarojn.
Ili puŝas min, malfacilaj, obstinaj momentoj,
klinita en la longa ombro de krepusko.
La vivo turniĝas kaj pasas kiel ebria kurfajro.

La tiamaj poeziaj vortoj de Du Fu. Ili povus esti imagitaj
en nia propra vintro. /Ingegerd



La Libro de Laŭzi (2003)

Libro de Laŭzi

*Pitagoro en Grekio, Sidarto
Gotamo en Hindio kaj Laŭzi en
Ĉinio – tri eminentuloj*

En la sama epoko, kiam Pitagoro (ĉ. 570–500 a.K.), en la antikva Grekio, malvolvis al siaj disĉiploj la Pitagoran Vojon al Dio, kaj Sidarto Gotamo (565–486 a.K.), en Hindio, predikis pri sia Darma aŭ la doktrino de la budhismo al siaj adeptoj, ekzistis en Ĉinio tria granda saĝulo respektiginda, kiu profunde pensis pri spirita vero, pri la universo kaj la homa vivo – Laŭzi. — *Elŝuti PDF-n:* <https://libro.ee/file.php?id=280>
Per <https://www.youtube.com/watch?v=2onJVX1rUNs> vi povas scii iomete pri la vivo de Laŭzi, elĉinigi Wang Chongfang.

Ĉu Lauzi kaj Laocio (sube) estas la sama persono? Mi pensas ke jes. /Siv

Saĝaj diroj de Laocio, ĉina filozofa

6:a jarcento antaŭ Kristo, fondinto de la taoismo

La potenco de amo!

Honoro sen amo iĝas orgojla.
Potenco sen amo iĝas kruela.
Devo sen amo iĝas ĉagrena.
Posedo sen amo iĝas avara.
Kredo sen amo iĝas fanatika.
Prudenteco sen amo iĝas fraŭda.
Vero sen amo iĝas kritikavida.
Ordo sen amo iĝas pedanta.
Justeco sen amo iĝas rigora.
Kompetento sen amo iĝas pravema.
Afableco sen amo iĝas hipokrita.
Respondo sen amo iĝas senrespekta.

orgojla – hōgmodig


ĉagrena – ledsam, förtretlig
avara – snål, girig

prudenteco – klokhet; *fraŭda* – svekfull
kritikavida – kritiklysten

rigora – hård, sträng
pravema – som har lust att ha rätt
hipokrita – hycklande
senrespekta – hänsynslös



El Ĉinio Vejdo ĉiun monaton publikigas poemojn el la tuta mondo



Kial ne abonu ĝin?

La oktobra numero komenciĝas per Teksado, brazila poemo, kiun Ora Ĵurnalo publikigis en la septembra numero. Releĝu ĝin! /Siv



La ĉina poeto Wang Chongfang skribas:

(laŭ ĉinesko *flirta kanto*)

Nove brizas

Festu, festu
kaj fidela restu!
Kristnaskiĝ' kun beno
estas sankta veno
Nove, nove
brizas ĉie blove.

El Popola Ĉinio

Libere elŝutu numerojn de la fama revuo **El Popola Ĉinio**, papera eldono de 1950 ĝis 2000. La Biblioteko de la Katolika Universitato de Lublino (Pollando) utile disponigas skanaĵojn de multaj numeroj (bedaŭrinde blanka-nigrajn, kaj ne de la tuta kolekto). Espereble oni iam konsideru projekton por skani (plenkolore) la kompletan serion de tiu elstara ĉina kontribuo al Esperanto! <https://libro.ee/book.php?id=1661>



Saniga gimnastiko de Shen Junru de YANG SHENG

S-ro Shen Junru (1875–1963) estis fama ĉina socia aktivulo. Sube estas la de li inventita kaj praktikata saniga gimnastiko. Dank' al sia longdaŭra praktikado li sane vivis 88 jarojn.

Nun tiu gimnastiko estas bonordigita kaj disvastigata de la koncerna departemento.

I. Movo de la talio. Staru rekte kun la du piedoj disigitaj je la distanco, kia tiu de la

ŝultroj. Tenu la du manojn ĉe la talio aŭ nature pendantaj. Turnu vin dekstren kaj maldekstren kelkajn fojojn.

II. Svingo de la piedoj. Staru rekte sur unu piedo. Nature kaj facile svingu la alian piedon internen kaj eksteren. Faru tion per la du piedoj alterne plurajn fojojn.

III. Parada paŝado. Post la supre diritaj movoj marŝu antaŭen per paradaj paŝoj, ĝis vi ŝvitetos.

IV. Froto de la piedoj. Sidu en lito kun la du kruroj interkrucitaj kaj unu piedo sur la alia femuro. Per via manplato frotu piedkavon kaj kalkanon plurajn fojojn ĝis varmiĝo kaj per la alia frotu tiujn de la alia piedo.

V. Froto de la lumboj kaj koksostoj. Per viaj du manplatoj frotu viajn lumbojn kaj koksostojn plurajn fojojn.

VI. Froto de la dorso kaj lumboj. Metu viajn manplatojn ambaŭflanken de la spino kaj forte puŝu viajn ok fingrojn (escepte de la du dikfingroj) plej supren kaj poste puŝu ilin malsupren plurajn fojojn. Faru tion kelkajn fojojn.

VII. Froto de la spino. Premu per viaj du manoj la spinon kaj forte puŝu la montran, mezan kaj ringan fingrojn maksimume supren. Puŝu ilin malsupren ĝis la kokso. Haltu momenton kaj daŭrigu la frotadon kelkajn fojojn.

VIII. Froto de la subventro. Frotu vian subventron per viaj dekstra kaj maldekstra manoj alterne plurajn fojojn. Tio estas utila al facila cirkulado de la vitala energio en la korpo kaj plezurigo.

”Kial malbone esti maldiligenta?”

Imagu ke estus milito kaj neniu irus tien” – Astrid Lindgren

Male al aliaj ursoj, la grandega pando estas plantomanĝanto, kiu ĉefe manĝas bambuofoliojn. Hodiaŭ ĝi troveblas sovaĝa en la ĉinaj provincoj Siĉuano, Gansuo kaj Ŝanŝjio, sed en la pasinteco la urso estis trovata ankaŭ en aliaj partoj de Orienta Azio. La grandega pando estas konata kiel la simbolo de la WWF kaj estis unu el kvin talismanoj por la Somerolimpikoj en Pekino en 2008. Donacoj de pando-ursoj al zooj estis uzataj kiel maniero por Ĉinio plibonigi siajn rilatojn kun ŝtatoj en la Okcidento.

El Wikipedia

*”Vad är det för fel på att vara lat? Tänk om det blev krig, och ingen gick dit.”
/Astrid Lindgren*



Libropropono de Ingegerd Granat

En malvarma januara tago en 2006, la Hudiksvall-polico faras teruran eltrovaĵon.

En la malgranda vilaĝo Hesjövallen masakro estis farita. 18 homoj estis buĉitaj en la plej kruela maniero.


Nur kompleta frenezulo povus fari ion tiel teruran.

Sed kiam juĝisto Birgitta Roslin en Helsingborg legas pri la krimo, ŝi estas frapita

per subita konstato. Ŝi estas parenca al ne nur unu el la murdviktimoj, sed al ĉiuj.

Ĉar la polico estas konsternita, Birgitta Roslin mem decidas provi malkovri kio okazis.

Tio kondukas ŝin sur vojaĝon kiu iras kaj longe reen en la tempo kaj al aliaj kontinentoj. Ĉar la spuroj ankaŭ



kondukas al nova granda potenco, kiu ĵus prenas sian ĝustan lokon sur la internacia mondscenejo.

Henning Mankell estis naskita la 3an

de februaro 1948 en Stokholmo. Al ni, li estas plej konata pro la polica komisaro Kurt Wallander en Ystad.

HENNING MANKELL KINESEN

Kurt Wallander faris ĉion por doni al ni dramon kaj eksciton televide, kaj en Ystad Wallander-itinero estis aranĝita por turistoj.

Mankell estis maldekstema kaj ofte elstarigis sociajn diferencojn inter homoj. Liaj libroj havas fascinajn personajn priskribojn, ĉu temas pri policistoj aŭ dancinstruistoj.

Henning Mankell estas la plej internacie legata aŭtoro de Svedio.

Liaj libroj estis tradukitaj en 37 lingvojn kaj estis publikigitaj en sumita eldono de 30 milionoj da ekzempleroj. *La ĉino* estas lia 27-a romano ekde lia debuto en 1973. Li finis sian verkistan karieron la 5-an de oktobro 2015 kiam li mortis, 67-jara.

/Ingegerd

La librofoiro 2022 en Gotenburgo

de Monica

Dum du tagoj mi vizitis la librofoiron. Antaŭe mi ne estis certa, ĉu mi iros al la foiro. En la lasta momento mi decidis iri. Mi estis timema pro la koronaviruso kaj portis maskon.

Mi vizitis multajn budojn kaj aĉetis kelkajn librojn.

Interese estis aŭskulti intervjuon kun la verkistino Jessica Schiefauer. Ŝi parolis pri skriblernejo. Antaŭ multaj jaroj mi havis ŝin kiel instruiston en skribkurso. Mi ricevis subskribitan libron de ŝi.

Mi volis aŭskulti aliajn prelegojn pri skribado, sed forgesis ilin kaj la horon.



La revuon "Skriva" (skribi) havis "Café Skriva" (Kafejo Skribi) en la unua etaĝo. Sed mi preterlasis la kafejon, ĉar interesaj prelegoj troviĝis dum alia horo dum la tago.

Mi ofte iris dum antaŭtagmezoj, ofte 2½ horojn. Do mi estis tro laca pro multe da irado tie kaj ankaŭ multe da bruoj por mia aŭdilo, kiu faris min tro laca en la kapo.

Estis multaj homoj tie. La unua horo estis plej bona por iri tien. Poste estis pli da homoj, kiuj venis tien. Mi ne ŝatas interpuŝiĝon. /Monica

Jessica Schiefauer estas verkistino kaj popola altlerneja instruisto en la sveda kaj la angla. La unua libro de Schiefauer, *Om du var jag*,

estis publikigita de la eldonejo de Bonnier Carlsen en 2009, la saman jaron kiam ŝi iĝis kvalifikita

instruisto. Ŝi tial neniam havis tempon por labori kiel instruisto pri la sveda kaj la angla, sed anstataŭe vivas per enspezo de sia verkado kaj instruado de skribkursoj. En 2011, Schiefauer ricevis la Aŭgust-premion en la porinfana kaj junullibrokategorio pro *Pojkarna* (La knaboj). La libro ankaŭ estis transformita en filmon. Ŝia libro *När hundarna kommer* (Kiam la hundoj venas) estas inspirita de reala murdo de knabo ĉe lago en la gotenburga regiono.



La Sabata grupo havas librorondon pri la libro *Katrina malfruas* de Sten Johansson



Ingegerd disdonis krucvortenigojn pri la unuaj naŭ ĉapitroj. Ĉiuj laboris! Laŭdire personoj, kiuj ne povis partopreni hodiaŭ, hejme studas la saman libron. »

Ankaŭ japana grupo legas la saman libron.

Post la paŭzo Ingegerd gvidis la unuan grupon kaj Andreas la duan.



Librolegado tre kontribuas al la vortrezoro, necesa por libere esprimi siajn pensojn. La ideo origine venis de Monica. Ĉi tiun tagon mi estis hejme pro malvarmumo.



La unuan bildon supre Ingegerd faris, la grupajn bildojn Magnus faris.

/Siv

”Hej! Hej!” al Häcken en Hisingen

Dimanĉe la 30-an de oktobro, la futbalteamo Häcken iĝis Sveda Futbalĉampiono. Ili venkis je 4–0 kontraŭ unu el la aliaj Gotenburgo-teamoj, IFK ”Änglarna” (La anĝeloj).

Ni gratulas ”Hisingshäcken” pro la granda gajno! La Esperanto-movado estas amiko de futbalo!

/Ingegerd



La 6an de novembro oni manĝas tortetojn kun la bildo de nia militema reĝo Gustav II Adolfo



La memortago de Gustav II Adolfo estis unue festita en la 19-a jarcento. Ĝi estis aldonita okaze de la 200-a datreveno de la morto de Gustavo II Adolfo en 1632. Oni precipe festas la tagon en Gotenburgo, urbo fondita de tiu reĝo.

En la antaŭindustria socio, la tago estis tute nekonata kiel tago de festado. La torteto de Gustav Adolf ne estas normigita sed estas bakita en multaj diversaj versioj, prefere kun la medaliono de la reĝo en ĉokolado aŭ en marcipano. /Siv

Esperanta prelego en Angered la 11an de oktobro

La Hejmregiona Societo (Hembygdsföreningen) en Angered, antaŭurbo de Gotenburgo, invitis Ingegerd kaj Lasse Granat informi pri Esperanto.

Loko: preĝejo Equmenia. El la ĉeestantaj membroj de la Hejmregiona Societo – ĉirkaŭ 20 personoj – estis nur du virinoj. Nekutime!

La etoso estis agrabla. Ĉiuj jam konas unu la alian. Nur mi estis fremdulo. La kontrasto inter la altegaj konstruaĵoj ĉirkaŭe kaj la nova malalta – sed larĝa – preĝejo estis aparta.

Ingegerd rakontis pri la agado de la gotenburga klubo per pluraj bildoj. Temis pri

- ekspozicioj en foiroj sur placoj diversloke en Gotenburgo,

- la Libro-foiro,
- vizitoj de tri germanoj el plezurkroza ŝipo,
- vizito en somerdometo en Kvarnabo,
- UK en Lahtio,
- la inaŭguro de nia biblioteko en Stannum, kie komunuma ĉefkonsilisto tondis la verdan bendon,
- pri urbaj promenoj,
- pri muzikado de ilia filino dum esperantaj renkontiĝoj... k.t.p.

Por mi estis multaj agrablaj memoroj. Ni fakte estis – kaj estas – vigla societo. 😊

Poste Lasse informis pri la esperanta gramatiko, ofte komparante ĝin kun tiu de aliaj lingvoj. La publiko kontribuis per sia lingvosperto. La ĉeestantoj foliumis esperantajn librojn – bunta elekto de libroj



por infanoj, por kursoj kaj ankaŭ troviĝis romanoj, novelaroj kaj – kompreneble – papera numero de Ora Ĵurnalo.

Ingegerd kaj Lasse bone disvastigas la scion pri Esperanto! Gratulon al ili!

/Siv

Skandinava Muzika Renkontiĝo

Pri kio temas?

Ni, kiuj ludis dum Tria Skandinava Kongreso en majo 2022, havis la ideon, ke ni povus aranĝi renkontiĝon ie kun la celo ludi kune kaj eventuale fari koncerton kun muziko en Esperanto por la publiko.

La dato kaj loko ankoraŭ ne estas decidita, kompreneble necesas tempon por antaŭplanado, do verŝajne printempe 2023. Ankaŭ estus dezirinde havi lokon alireblan por esperantistoj el niaj najbaraj landoj. Kelkaj eblaj lokoj povus esti Folkkulturcentrum, la kultura domo en Hjorthagen en Stokholmo, kie SEF havis sian jarkunvenon en 2019, sed ni ja ankaŭ tiam daŭre havos aliron al la SEF-a "stokejo" en Herrljunga.



La unua paŝo estas esplori kiom da homoj estus interesitaj. Tial, se vi estas, bonvolu sendi mesaĝon al ni kaj indiku kiujn instrumentojn vi ludas, kaj kiujn vi povus eventuale alporti mem.

Se vi havas demandojn – kontaktu muzika-renkontigo@esperantonordio.org

Beslöjad sol livgivande stjärna – Vualita suno viviga stelo

av/de Renate Säfström



Molntunga skyar
Stjärnan stundtals dold
Vintertid nalkas
Oktober det är

Morgonen är sen
Kvällen för tidig
Mörker omsluter
Hotfullt utan gräns

Knappt hörbart ett rop
ur en klar källa
– ljus ska skina
– mörkret ge vika
– sanningen befria

Vi tändar vårt ljus
hoppas, längtar, tror
kärlek är dess namn

Det kommer en dag

Pezaj nuboj
La stelo foje kaŝita
La vintro proksimiĝas
Oktobro estas

La mateno estas malfrua
Vespero tro frua
Mallumo envolvas
Minacante sen limo

Apenaŭ aŭdebla krio
el klara fonto
– lumo brilos
– mallumo cedos
– la veron liberigi

Ni lumigas nian kandelon
esperas, sopiras, kredas
amo estas ĝia nomo

Iam tago venos

Atentu, eta arvikolo!

*Se upp lilla sork!
Fjällvråk på väg ner!*

Atentu, eta arvikolo!
Vilkrura buteo malsupreniras!



Nuba tago en Hisingen, Gotenburgo

de Jan Hellström



Ruĝpieda falko – Aftonfalk.

Mi venas sidanta en aŭto sur kampara vojo. Preterpasinte bienon kun multaj brutoj, ni vidas plurajn homojn kun fotiloj kaj binokloj starantaj apud la vojo, spektante.

Ni haltas kaj demandas viron: Ĉu vi vidis ĝin? Jes, ĝi flugis kaj ĉasis ĉi tie, sed nun mi ne vidas ĝin.

Ni daŭrigas ĝis la parkejo ĉe la vojkruciĝo. Kiel agrable, ĝi ne estas plena! Tuj kiam mi eliris el la aŭto, mi diris al mia kunulo: – Rigardu tien, ĝi sidas en la plej proksima morta arbo, ĉe fotodistanco. Subite ĝi komencas ĉasekskurson por kapti insektojn, sed revenas al la juniperarbusto. La sama afero okazas kelkfoje. Ni sukcesas fari plurajn bildojn, antaŭ ol ĝi flugas pli foren.

Nun kelkaj el la homoj, kiuj staris laŭlonge de la vojo, venas promenante. Mi rekonas la voĉon de unu. Tute certe temas pri amiko el Uddevalla, kiun mi delonge ne vidis. Poste aperas pluraj birdobservantoj, kiujn mi ankaŭ delonge ne vidis.

Ja, eliri en la naturon provizas plurajn spertojn, parte la renkontiĝo kun birdoj kaj bestoj, sed ankaŭ kun aliaj birdaj

entuziasmoj. Oni helpas unu la alian esplori. La specio-celo hodiaŭ estis la ruĝpieda falko, kiun ni bone vidis kaj sidante kaj ĉasante. Ni ankaŭ ekvidis nizon kaj turfalkon ĉasantajn. Dum ni estis forirontaj, iu vokis: Estas granda lanio sidanta sur la traktoro.

Ankaŭ nuba tago, kiel hieraŭ, povas doni bonegajn spertojn.

Kosmosgården, Martinus Center, Varnhem

de Siv

Dum la semajnfino, 7–9 septembro, mi ĝuis restadon en Kosmosgården. Skövde estas la plej proksima urbo. Lars Malmgren, emeritita instruisto, prelegis pri la mondbildo de

Martinus kaj komparis kun la nuna bildo de la mondo, kiun ni ricevas gazete, radie, televide kaj interrete.



La ĉefa konstruaĵo estas en la realo pli longa ol tiu, kiun vi vidas sur la bildo. La iama bovinejo 😊 nun enhavas kuirejon, preleg- kaj diskutsalonon kaj multajn etajn ĉambrojn por la partoprenantoj. Plej maldekstre estas la eniro al ĉambro kie oni vendas librojn, verkitaj ĉefe de Martinus, sed ankaŭ de aliaj.




Troviĝas pluraj domoj en la areo. Do oni ricevas freŝan aeron, promenante inter ilin. En la domo maldekstre ni matenmanĝis, lunĉis kaj vespermanĝis. Kafopaŭzoj okazis en la ĉefkonstruaĵo.

Entute 28 personoj de la suda parto de Svedio ĉeestis la kurson. Unu el ili – kun la sama nomo kiel mi – jam vizitis Kosmosgården plurajn fojojn kaj certe daŭrigos la vizitojn kaj povas rakonti pri la

historio de Kosmosgården. Ŝi venas el Kalmar.

Lars Malmgren prelegis, rakontis, kantis, ludis la gitaron kaj tre inspire logis nin pripensi la ideojn de Martinus en la Tria Testamento kaj kompari ilin kun la nuna stato de la mondo. Ni ankaŭ diskutis en pli malgrandaj grupoj.

Post la semajnfino ni iris hejmen kun multaj novaj pensoj kaj kun adresoj al novaj amikoj.



Lars Malmgren.



Konceptoj fiksitaj en mia memoro:

Tempo... Ni estas eternaj estaĵoj – ĉiam estis kaj ĉiam estos. La ekonomio de la estonta perfekta socio estos bazita sur *tempo*.

Martinus opinias, ke estonte ni laboros signife malpli ol hodiaŭ. La sola reala valoro estas homa kreivo. Tio, kion vi konsumas, bezonis certan tempon por produktiĝi, kio do devas respondi al via labor*tempo*.

Reenkarniĝo – kompreneble. Ni okupiĝas pri formado de evoluo sur la tero. Ni naskiĝas en medio, kie ni havas taskon por plenumi. Ni ne timu morton, tiom ofte kiom ni mortis kaj reinkarniĝis.

Infanoj Ni kredas, ke infano estas malplena skribtabulo, kiu ricevas sian karakteron el la DNA de la gepatroj. Tio estas nur parte vera. Tiam vi prenas la deirpunkton de la tera materio. Martinus komencas per la spirito. Infanoj naskiĝas en la medio, kiu plej bone povas kontribui al la evoluo de la individuo.

Preĝo estas grava, malgrandaj ĉiutagaj konversacioj kun Dio. Pensoj estas pli gravaj ol ni pensas. Ili formas nian karmon – pozitivan same kiel negativan. Ĉio, kion ni pensas kaj faras, revenos al ni iam.

Malbono kaj mallumo devas esti spertaj kiel kontrasto al la lumo.

Karmo – justa vero. Kion ni semas, ni rikoltos. Ama-boneco plibonigas nian karmon.

Spirita... Ĉio ankaŭ havas spiritan flankon. Eĉ la tero estas vivanta estaĵo, kiu evoluas kaj ebligas ke nia ekspluatado kaj

misadministrado de la teraj rimedoj estu sekvataj de naturaj katastrofoj.

Ĉio havas signifon – se la pluvarbaroj estas ekstermitaj, la signifo povas esti, ke la "mortiga principo", kiel venenaj serpentoj kaj insektoj, malaperu de la tero.

Milito estas io malbona, kiu finfine povas ankoraŭ alporti ion bonan. Homoj kiuj suferas, disvolvas empatian kaj komprenon de la sufero de aliaj. En la plej multaj religioj kaj pensmanieroj, Dio estas nur lumo, sed en la pensomondo de Martinus, "ĈIO ESTAS TRE BONA". Mallumo kaj lumo devas ambaŭ ekzisti.



Leĝoj de vivo Se vi malobeas la leĝojn de la vivo, estos konsekvencoj.

Pensmaniero de grego – preskaŭ ĉiuj estas influitaj de la reganta opiniotendenco. Veristoj estas kontraŭbatalataj. Tamen, estas tiuj, kiuj sendepende pensas, kiuj antaŭenigas evoluon.

Scienco – fizika kaj spirita Ili ambaŭ komencas alproksimiĝi unu al la alia.

La signifo de la vivo: evolui en homajn homojn, kiuj povas konstrui homajn sociojn. Fariĝi Kristosimila. Homoj nun spertas malhelan proceson, kiu estas la bazo por pli hela regno sur la tero.

Tiel mi ekpensis. Kiel vi pensas? Sed, ĉefe – kiel Lars Malmgren klarigas la suferon? Alklaku la ligilon! /Siv

2019-07-02 – **Lidandets mening – Lars Malmgren** – YouTube:

<https://www.youtube.com/watch?v=MEs6Un9qTno>

Hilma af Klint

El Facebook – La Tria

Testamento – Nina Hedlund:

”If Oslo has a Munch museum, why would Stockholm not have a Hilma af Klint museum?”

– nova artikolo pri Hilma en **The Guardian**.



Tora Hallström kiel Hilma af Klint en nova filmo. Dalya Alberge fotis.

Malmultaj homoj aŭdis pri Hilma af Klint, des malpli vidis la centojn da pentraĵoj kaj desegnaĵoj, kiujn kreis la sveda artisto en la 20-a jarcento. La arta establado ignoris ŝin kaj ŝi apenaŭ vendis eĉ unu pentraĵon.

Nun, preskaŭ 80 jarojn post ŝia morto, ŝi estas la eksterulo, kiu trovis rekonon kiel vizia artisto, pionira stelo de abstrakta arto. Sep-voluma studo kaj biografio estos publikigitaj ĉi-monate, Tate Modern planas ekspozicion en 2023 kaj Oscar-nomumita produktoro faris gravan filmon pri ŝi, kun rolantaro kiu inkludas Lily Cole.

Kiel klarvida kaj mistikulo, af Klint kredis ke ŝiaj abstraktaĵoj estis pentritaj sub la gvido de pli altaj spiritoj kaj ke la mondo ne estis tute preta por ŝia radikala arto, sed ŝi verŝajne neniam anticipis tian postmortan aklamon.

Ŝi evoluigis ”vortprovizon” de trianguloj, kvadratoj, cirkloj kaj spiraloj antaŭ ol Vasilij Kandinskij, Piet Mondrian kaj Kazimir Malevich deklaris sin la inventintoj de abstraktado. Dum Kandinsky asertis ke li kreis la unuan abstraktan pentraĵon en 1911, af Klint fakte kreis tian jam en 1906. Kiel Mondrian kaj Kandinsky, ŝi mortis en 1944.

Intereso pri ŝia laboro kreskis post ekspozicio en 2016 ĉe la Serpentine-galerio en Londono, kaj transdoniĝis al la Guggenheim Museum en New York, kie ĝi rompis spektantaro-rekordojn kun proksimume 600 000 vizitantoj. Daniel Birnbaum, kiu prizorgis la Serpentine-version, diris al la Observer: ”Ĝi estis la plej bone vizitata spektaklo en la historio de la institucio – ĉi tiu artisto, kiu ne montris sian laboron dum sia vivo.” /Siv

Pioniraj virinoj (daŭrigo)



13. Karin Värmefjord (1944–1989)

La unua ina poliestro de Svedio (en 1981).

- 1971 – jura diplomo
- En 1972 komencis trejnadon de poliestro
- 1975–1981 subpoliestro
- En 1981 – poliestro en Ludvika

14. Kristina Odenberg (1940–)

- En 1997 ŝi iĝis la unua ina episkopo de Svedio
- 1997–2007 episkopo en la diocezo de Lund. 2001 granda atento pri la samseksa partnereca servo.

Odenberg estis por tempo politike aktiva en la Konservativa Partio kaj ŝia frato Mikael Odenberg estis la defendministro de Svedio en 2006–2007. Ŝi estis ordinata en Stokholmo la 17-an de decembro 1967. Kiam la tiama episkopo de la diocezo de Lund, K. G. Hammar, iĝis ĉefepiskopo de Upsalo, Odenberg estis nomumita lia posteulo la 5-an de junio 1997, kaj estis ordinata la 5-an de oktobro el la sama jaro. Tio iĝis ŝin la unua virino iĝanta episkopo en la historio de la Eklezio de Svedio.



La 27-an de decembro 2001, ŝi altiris grandan koleregan atenton kaj de kelkaj grupoj kiam, en prediko nomita "la donaco de amo", ŝi benis la partnerecon de Anna Karin Hammar kaj Ninna Edgardh Beckman. Ŝi eĉ estis akuzita fare de kelkaj grupoj de malobservo de ŝiaj pastraj promesoj benante ion, kion ili asertis estas peko. Odenberg estas spirita

patrono de la sveda parto de la Ordeno de Sankta Lazaro.

En januaro 2007, ŝi ricevis la medalon de la reĝo je la 12-a grandeco en la Ordo de Serafimoj. Christina Odenberg ekŝiĝis la 31an de marto 2007 kaj estis sekvita de Antje Jackelén.

15. Antje Jackelén (1995–)

- La unua ina ĉefepiskopo de Svedio en 2014
- 1980 pastra ordiniĝo
- 2006 episkopo en la diocezo de Lund
- En 2014, estis konsekrita kiel ĉefepiskopo en la katedralo de Upsalo kaj iĝis la unua ina ĉefepiskopo de Svedio.



16. Jessica Meir (1977–)

Unua sveda virino en la spaco 2019.

- En 2013, trejnado ĉe NASA komenciĝis
- 2015 finis la edukon al astronauto
- 2019–2020 kosmoflugo al la ISS kiel la unua sveda virino en la kosmo
- 2020 teknologio honordoktoreco en Luleå

Ŝi partoprenis en la Ekspedicio 61/62 sur la Internacia Kosmostacio (ISS). La 25-an de septembro 2019, ŝi estis lanĉita sur la kosmoŝipo Soyuz MS-15, kune kun kosmonaŭto Oleg Skripochka kaj astronauto

Hazza Al Mansouri, por vojaĝi al la ISS-kosmostacio. La lanĉo estis farita el la Kosmodromo Bajkonur en Kazaĥio Meir, denove alteriĝis sur la teron la 17-an de aprilo 2020.

17. Magdalena Andersson (1967–)

La unua ina ĉefministro de Svedio en 2021.

- 1992 magistro pri ekonomio
- Doktoro pri ekonomio
- 1996–1998 estro de planado en Statsrådsplaneringen
- 2009–2012 altranga direktoro ĉe la Sveda imposto-agentejo
- 2014 La financministro de Svedio
- 2021 La unua ina ĉefministro de Svedio

Eva Magdalena Andersson, naskita la 23-an de januaro 1967 en Upsalo, estas sveda civila ekonomikisto kaj politikisto kiu estis ĉefministro de Svedio inter la 30-a de novembro 2021 kaj la 18-an de oktobro 2022.

Andersson estas la unua virino fariĝinta ĉefministro en Svedio. Andersson estis la financministro de Svedio 2014–2021. La 4-an de novembro 2021, Andersson estis elektita partiprezidanto de la Socialdemokratoj. En decembro 2020, ŝi estis elektita prezidanto de la plej alta konsila organo de la Internacia Monunua Fonduso, la IMFC, iĝante la unua virino se temas pri teni la postenon. Ŝi forlasis la postenon en aprilo 2022. En la jaroj



2009–2012, ŝi estis ĉefdirektoro ĉe la Sveda imposto-agentejo.

Je la Ĝenerala elekto, la 11an de septembro en 2022, la dekstruloj kaj la maldekstruloj unue ekhavis sufiĉe egalajn nombrojn de voĉoj, sed fine la dekstruloj venkis. La socialdemokrata Magdalena Andersson eksiĝis kaj Ulf Kristersson de la Moderata partio iĝis la nova ĉefministro.

El japana montrofenestro

de Inga Johansson



Jen la ĉi-jara montrofenestro el Japanio. Estas Japana Esperanto Instituto kiu dum multaj jaroj kaj preskaŭ ĉiumonate atentigas la plej novan pri Esperanto.

Mi ekkonsciis pri Esperanto fine de la 60-aj jaroj, kiam mi kaj amiko preterpasis la Esperantan placon. En la konstruaĵo, kie nun troviĝas la Lingva Kafejo, estis montrofenestro kun gravaj informoj pri Esperanto. Tiutempe, ekzistis neniu lingvokafejo aŭ kunveno en la konstruaĵo, sed butikfenestro estis disponigita, ĝuste ĉar ĝi estis ĉe la Esperanto-placo. Poste ni havis kunvenejon sur la unua etaĝo por mallonga tempo, kiun ni heredis de la Sveda-Kubo-Asocio, kie mi tiam estis kasisto.



Klubo en Japanio kaj klubo en Gotenburgo legas la saman libron – *Katrina malfruas* de Sten Johansson, Svedio

Inga Johansson skribas:

Mi trovis ĉi tiun tekston ĉe Tvitero la 15an de oktobro. Komence mi pensis, ke estas iu en Gotenburgo, kiu skribis, sed ĝi montriĝis esti klubo en Japanio.

Saluton! Ni lernas Esperanton en Saitama, Japanujo. Niaj membroj pepas ĉi tiujn slipojn. /さいたま市を中心に活動しているエスペラント会です。「エスペラント」とは1887年に発表された人工語でいまでも世界中にその学習者や話者がいる国際補助語です 😊

Ses membroj kolektiĝis en hieraŭa regula kunveno. Komence ni babilis pri ĝojaj novaĵoj; vojaĝo al Kioto, videoluda konkurso en la kompanio, hieraŭa vespermanĝaĵo, ktp. Kaj pri Esperanto-Muzeo Jokohama. Ni eklegis "Katrina malfruas" de Sten Johansson. Ni antaŭĝojas la rakonton.

Jen ligilo al mallonga filmo farita de la Saitama klubo:

https://mobile.twitter.com/saitama_eo

Saitama Esperanto-Rondo ★ 埼玉エスペラント会 (A@saitama_eo) / Twitter

La UN-tago estas festata la 24-an de oktobro



Kiel funkcias lernejoj por videbliki la Tagon de UN?

La Sveda UN-Asocio publikigas materialon elŝuteblan de instruistoj – sed ne de gepatroj aŭ aliaj interesitaj partioj. (Domaĝe pensas Siv)

La 24-an de oktobro 1945 ekvalidis la Ĉarto de UN kaj formiĝis UN. La Ĉarto de UN estas la dokumento kiu gvidas la laboron de UN.

La UN-tago estas festita ekde 1948. En 1971 la Ĝenerala Asembleo de UN rekomendis, ke la tago estu observita de la membroŝtatoj kiel nacia festo.

La ĉi-jara lerneja materialo, **FN – för en hållbar fred** (UN – por daŭripova paco), celas doni enrigardon pri la paclaboro de UN, bazita sur daŭrantaj konfliktoj en la mondo. Per la materialo oni povas interalie diskuti pri la monda situacio surbaze de aferoj de kunlaboro, infanaj rajtoj, konfliktsolvado kaj nuklea malarmado.

Sincere Cecilia Tengroth, Ĝenerala sekretario de Sveda UN-Federacio

Verda energio kontraŭ homaj rajtoj en okupita Okcidenta Saharo

VÄST SAHARA

47, plejparte junaj homoj venis al la Monda Kulturmuzeo en Gotenburgo la 5-an de oktobro por aŭskulti Erik Hagen el Okcidenta Sahara Resource Watch, kiu parolis pri la sun- kaj ventoprojektoj de Maroko en la okupata parto de Okcidenta Saharo...

Maroko nun havas la reputacion esti la plej bona en la mondo pri verda energio, sed la vero estas ke granda parto de suna kaj vento energio venas de Okcidenta Saharo – kaj ĝi plivastiĝas. En 2030, duono de la ventoenergio de Maroko estas taksita veni de okupata Okcidenta Saharo, diras Erik Hagen.

La silento pri la renovigebla energio tie uzata estas tre utila por eternigi la okupon. La rabado de la krudaĵoj de Okcidenta Saharo povas daŭri. La verda energio iras al la fosfatindustrio, fiŝfarmoj kaj la grandaj forcejoj en suda Maroko. Ĉiuj operacioj estas en marokaj manoj. La gajnoj iras al Maroko. Krome, la energio servas al la maroka armeo kaj al la polico, kiuj faras konstantajn maljustaĵojn kontraŭ la okcidenta sahara loĝantaro. Estas malpermesite kontraŭi la marokan okupadon.

– Marokaj policanoj prispionas okcidentajn saharanojn, kontrolas iliajn retmesaĝojn, minacas ilin aŭ iliajn parencojn kaj faras malverajn akuzojn kontraŭ la okcidentsaharaj aktivuloj, kiuj tiam estas kondamnitaj.

La eksterlandaj kompanioj implikitaj en la energiprojektoj kaj aliaj agadoj devas esti respondecigitaj. Ili kontribuas al la eternigo de la okupado de Maroko.

– Kontakto viajn bankojn kaj kontrolu ĉu iliaj akciaj havoj inkluzivas kompaniojn kun



Erik Hagen WSRW en interparolo kun Lars Schmidt en Världskulturmuseet (Monda Kulturmuzeo) en Gotenburgo. Foto: Karin Alsén.

operacioj en okupata Okcidenta Saharo! instigas Erik Hagen.

Sed eĉ la klimata agentejo UNFCCC ne havas purajn fingrojn, diras Erik Hagen. Kiam la landoj de la mondo devas raporti ĉu iliaj respektivaj klimataj celoj estis plenumitaj laŭ la Pariza Interkonsento, Maroko inkluzivas la Okcidentsaharan renoviĝantan energion en siaj raportoj. Kaj neniuj protestoj estas aŭditaj.

Kiam temas pri akiro de energia ekspansio, la maroka reĝo esence gajnas ĉiujn ofertojn. Li estas ne nur religia gvidanto sed ankaŭ armea kaj politika. Li laŭdire posedas 10 procentojn de la ekonomio de Maroko. Hodiaŭ ne ekzistas energikabloj de la okupata Okcidenta Saharo al Maroko mem, sed tio estas planita kaj baldaŭ estos en la loko. La sama validas por kablo de Maroko al Britio. Same kiel UN, EU ankaŭ subkliniĝas antaŭ la rabado de Maroko. Sepoble la Fronto Polisario de Okcidenta Saharo venkis EU en la Eŭropa Kortumo pri fiŝkaptaj interkonsentoj

kaj komercaj interkonsentoj kun Maroko. Tio inkluzivas okcidentsaharajn varojn.

– Svedio, kiel la sola lando, honorinde ĉiam voĉdonis ĝuste – kontraŭ la ŝtelo, diras Erik Hagen.

Tiu ĉi aranĝo estis organizita de la Monda Kulturmuzeo kunlabore kun Afrikagrupo de Gotenburgo.

Lena Thunberg – 2022-10-06

Tidskriften Västsahara, tel 070-475 46 45,
lena@vastsahara.net, sveda pg 204003-8

Nia kongola amiko Espoir gvidos retkurson

(el Eventa Servo)

Nia klubo organizas esperantokurson por SVAHIL-PAROLANTOJ.

La esperanto-kurso disvolviĝas rete de 20:00 ĝis 21:30 laŭ (UTC+2 horzono), komencante 9 novembro 2022.

Partoprenos lernantoj el D.R. Kongo, Tanzanio, Burundo, ... Ankaŭ vizite ĉeestos aliaj spertaj esperantistoj por instigi al niaj novaj Esperantistoj obstine daŭrigi la lernadon; ni estos ĝojegaj vidi vin inter ni.



La kurso okazas rete per Vacapo (= la *What's up?*-apo). Ĉu vi volas troviĝi en la vacapa lernejo-grupo? Tiam alklaku tiun ĉi ligilon:

<https://chat.whatsapp.com/BmkGXk8xFP8KckZxvhmedE>

Aŭ kontaktu mi per +243 9727 16042.

Esperante vidi vin,

Espoir NGOMA KASATI, Instruisto,
Lubumbaŝo


Gratulon al vi, Espoir! Vi multon faras por Esperanto! /Siv

Leteroj al redakcioj en Gotenburgo kaj Stokholmo

El la gazeto *Göteborgs-Posten*, 22 oktobro 2022

Ne ĉiutage la Esperanto-Societo de Gotenburgo videblas en G-P, sed sabate de oktobro estis en la gazeto la sekvaj kontribuantoj. La bildo estas la sama, kiun GP elektis en marto, kiam la antaŭa sendinto estis prenita. Ni trovos pli amuzan bildon!

Det är inte varje dag Göteborgs Esperantoförening syns i G-P, men en lördag i oktober fanns nedanstående insändare i tidningen. Bilden är densamma som GP valde i mars, då föregående insändare togs in. Vi får hitta en roligare bild!



Ne akceptebla, ke bibliotekoj ne havas librojn en Esperanto.

Kial oni forgesas kontroli la esperantan eldonadon? skribas kelkaj al la gazetaj redaktoroj.

Ĉu la bibliotekoj en Gotenburgo vere estas demokratiaj? Esperanto-Societo de Gotenburgo faras tiun demandon lige al tio, ke estis libro kun islamista propagando en pluraj bibliotekoj en Gotenburgo. Kiel ĉi tiu aĉetprocezo povas esti ebla?

Esperanto-Societo de Gotenburgo dum multaj jaroj luktas por ke modernaj lernolibroj kaj fikcio en Esperanto estu sur la bretoj.

Eĉ la biblioteko en Gamlestan, kiu nomiĝas Monda Literatura Domo, ne havas tiajn. Estas libroj en samea, meänkieli kaj aliaj minoritataj lingvoj, sed ne en Esperanto, kies reprezentantoj laboras por paco, kompreno kaj demokratio tutmonde.

Kial vi forgesas kontroli la esperantan eldonadon? Aŭ ĉu vi ne volas tion?

Estas multaj nove eldonitaj Esperanto-libroj, kiuj devus esti en la bibliotekoj, almenaŭ en Gamlestaden. La literaturo en Esperanto estis malakceptita de la Urba Biblioteko en Gotenburgo.

Ĉi tio estas malracia! Tiu ĉi literaturo volas antaŭenigi demokration kaj plurlingvismon.

Ingegerd Granat, Siv Burell kaj Folke Wedlin, Esperanto-Societo de Gotenburgo

Orimligo att bibliotek inte har böcker på esperanto.

Varför glömmar man att bevaka esperantoutgivningen? skriver insändarskribenterna.



Är biblioteken i Göteborg verkligen demokratiska? Den frågan ställer Göteborgs Esperantoförening i samband med att det förekommit en bok med islamistisk propaganda på flera bibliotek i Göteborg. Hur kan denna inköpsprocess vara möjlig?

Göteborgs Esperantoförening har under många år kämpat för att moderna läroböcker och skönlitteratur på esperanto ska få finnas på hyllorna.

Till och med biblioteket i Gamlestan, som kallas Världslitteraturhuset, har inte detta. Där finns böcker på samiska, meänkieli och andra språkminoriteter, men inte på esperanto, vars företrädare arbetar för fred, samförstånd och demokrati världen över.

Varför glömmar man att bevaka esperantoutgivningen? Eller vill man inte det? Det finns många nyutgivna esperantoböcker som borde finnas på biblioteken, åtminstone i Gamlestaden. Litteratur på esperanto har avvisats av Stadsbiblioteket i Göteborg.

Detta är orimligt! Den här litteraturen vill ju föra demokratin och mångspråkigheten framåt.

Ingegerd Granat, Siv Burell och Folke Wedlin, Göteborgs Esperantoförening

Titti Hagström el Stokholmo sendis ĉi tiun tekston al Ora Ĵurnalo, trovita en la gazeto "Vi i Vasastan"

Ni bezonas plian informadon en la lingvo Esperanto. Esperanto ekzistas de preskaŭ 130* jaroj hodiaŭ. Bedaŭrinde, la lingvo ne ricevis la agnoskon, kiun ĝi meritas.

Vi behöver mer information på språket esperanto. Esperanto har funnits i nästan 130* år idag. Tyvärr har inte språket fått det erkännande, som det förtjänar.

En tempoj de ksenofobio, rasismo kaj izolismo, Esperanto povas servi kiel ilo por malmunti barojn al homa kontakto, pliigi komprenon inter diversaj popoloj kaj finfine konduki al pli paca mondo.

Estonte, la publika sektoro devus do ankaŭ informi en Esperanto, rekoni Esperanto-parolantojn kiel etnan malplimulton kaj influi al EU ankaŭ uzi Esperanton en siaj merkato, protokoloj kaj agoj.

Bernt Jakobson, STHLM.

** Mia komento: Esperanto ekzistas en 135 jaroj. La unua lernolibro aperis jam en 1887. /Siv*



I tider av främlingshat, rasism och isolationism kan esperanto tjäna som ett verktyg att nedmontera hinder för mänsklig kontakt, öka förståelse mellan olika folk och i slutändan leda till en fredligare värld.


Framöver borde därför även offentlig sektor informera på esperanto, erkänna esperantotalande som etniskminoritet och att

påverka EU att i deras marknadsföring, protokoll och aktioner även använda sig av esperanto.

Bernt Jakobson, STHLM

** Min kommentar: Esperanto har funnits i 135 år, första läroboken kom 1887. /Siv*

Repliko 4 novembro de nia letero al la redaktoro 22 oktobro: "Ne akceptebla, ke bibliotekoj ne havas librojn en Esperanto"



Ni klopodas por akiri la deziratajn librojn aĉetebajn per niaj provizantoj, skribas Helena Jannert kaj Anna Petrén Kihlström.

Vi gör vårt bästa för att få tag i de önskade böcker som går att köpa in via våra leverantörer, skriver Helena Jannert och Anna Petrén Kihlström.

(foto: Paul Wennerholm/tt)

Ni akceptas aĉetproponojn por libroj.

La bibliotekoj en Gotenburgo senĉese kontrolas la eldonadon de literaturo en Esperanto. Estas malfacilaĵoj ligitaj al havebleco kaj kvalito, kiam temas pri aĉeto de libroj en Esperanto de la provizantoj kun kiuj ni havas interkonsentojn. Malgraŭ tio, laŭ la nacia serĉservo LIBRIS, ni ankoraŭ havas la

Vi tar emot inköpsförslag av böcker.

Biblioteken i Göteborg bevakar kontinuerligt utgivningen av litteratur på esperanto. Det finns svårigheter kopplat till tillgänglighet och kvalité när det gäller inköp av böcker på esperanto från de leverantörer vi har avtal med. Trots detta har vi, enligt den nationella söktjänsten LIBRIS, ändå det största utbudet

plej grandan elekton de nove eldonitaj kaj aktualaj titoloj en Esperanto el ĉiuj publikaj bibliotekoj de la lando.

Kiam ni aĉetas, ni konsideras la dezirojn de niaj prunteprenantoj kaj faras nian eblon por akiri la deziratajn librojn aĉetebajn per niaj provizantoj kaj kiuj sekvas la gvidliniojn de la kultura administracio por aĉetoj inter la amaskomunikilaj medioj. Eĉ se ni ne ĉiam sukcesas, ni dankas por konsiloj, do ne hezitu kontakti nin kun sugestoj de aĉetoj.

Anna Petrén Kihlström

administranto de komerca areo de la Urba biblioteko

Helena Jannert

estro de Disvolviĝo kaj administra subteno de la Gotenburga biblioteko kaj kulturdomo

Komento: Antaŭ kelkaj semajnoj ni invitis la bibliotekon de Gamlestaden/Monda Literaturan Domon al la biblioteko de Stannum – ĝuste por doni konsilojn pri libroaĉetado. Ĝus ekoficis nova administranto. Ŝi akceptis nian inviton pozitive kaj revenos en taŭga tago. Ni kunmetos liston de sugestoj por libroaĉetoj.
/Siv

av nyutgivna och aktuella titlar på esperanto av alla folkbibliotek i landet.

Vid inköp tar vi hänsyn till våra låntagares önskemål och gör vårt bästa för att få tag i de önskade böcker som går att köpa in via våra leverantörer och som följer kulturförvaltningens riktlinjer för medieinköp. Även om vi inte alltid lyckas så är vi tacksamma för tips, så tveka inte att ta kontakt med oss med inköpsförslag.

Anna Petrén Kihlström

verksamhetsområdeschef Stadsbiblioteket

Helena Jannert

enhetschef Utveckling och ledningsstöd
Göteborgs bibliotek och kulturhus

Kommentar: För någon vecka sedan inbjöd vi Gamlestadens bibliotek/ Världslitteraturhuset till Stannums bibliotek – just för att få ge tips om bokinköp. En ny chef hade just tillträtt. Hon mottog vår inbjudan positivt och återkommer om lämplig dag. Vi ska sätta ihop en lista på förslag till bokinköp. /Siv

Förslag till inköp av esperantoböcker till bibliotek

av Siv Burell



La strato de Tanja – vivo en Rusio 1917–2017 av **Kalle Knivilä**. Förlag: Mondial, New York, ISBN 978-1-59569-355-6. Utkom 2017.

Dokumentär om vardagsliv på en gata i Sankt Petersburg från revolutionen 1917 till maj 2017. *

Sur bluaj planedoj, sciencfikciaj noveloj av **Laure Patas d'Illiers**, skriven direkt på esperanto 2021 Förlag: Espéranto France (<https://esperanto-france.org>). Då jag köpte den från BOKUS fick jag den med stor text. Bra!! ISBN 978-2-9578961-2-7.



23 fristående noveller om rymdfärder, artificiellt Intelligens, utforskande av planeter, tidsresor, omöjlig kärlek mellan individer från olika kulturer och epoker,


strategier för överlevnad efter naturkatastrofer. Mycket humor och fantasi.



Sesdek ok av **Sten Johansson** utgiven av Mondial, New York, ISBN: 9781595694126.


Handlar om studentupproren 1968 mest i Paris, men också i Stockholm och Lund. Huvudpersonen läser franska vid Sorbonne och upplever kärlek och besvikelser. I bakgrunden upplever vi världshändelser som Vietnamkriget, Rysslands intåg i Tjeckoslovakien, de Gaulles uppträdande, men också händelser i Sverige.

<https://www.bokus.com/bok/9781595694126/sesdek-ok-originala-romano-en>.




Zulejka malfermas la okulojn av en tatarisk författare – **Guzel Jahina** 2022. Eldoninto: Ars-Libri, Eldonjaro: 2022 Formato: 470 paĝoj, 24 cm, ISBN: 978-83-63698-57-7. Översatt till esperanto av T. Chmielik.

Handlar om Gulagperioden i Sovjetunionen. Väckte stort intresse då den utkom 2015 och har sålts i 120 000 ex. *




La Granda aventuro kaj aliaj noveloj av **Ferenc Szilágyi**. Serie: Literatura klubo Stelo libro. Förlagsfören. Esperanto, 1945. Amazon och Adlbris säljer den.

Skriven direkt på esperanto. Ferenc Szilágyi var från Ungern, men bosatte sig i Borås och blev svensk medborgare. Novellerna är glada, sorgliga, tragiska, satiriska – som livet själv. *



Arne, la ĉefido – Arne hövdingasonen – av **Leif Nordenstorm**. Utgiven 2005 ISBN: 978-80 87169-99-5. Direkt skriven på esperanto.


En ungdomsroman om några vänner på vikingatiden. Berättelsen är fiktiv, men känns verklig.



Ilustrita frazeologio av **Sabine Fiedler** och **Pavel Erak**. Förlag www.kava.pech.cz/esperanto

Talesätt och ordspråk med roliga illustrationer. Förklaringar av ordens ursprung och


översättningar till ett antal andra språk



Home en senhomeco av **Martin Stuppig**. Kom 2016

Minnen från andra världskriget, då författaren, en esperantist, var tvungen att strida för Tredje Riket

Ursprungligen skriven på tyska.



La knabo, kiu vivis kun strutoj av **Monica Zak**. ISBN 978-91-519-1606-4. Översatt från svenska till esperanto av Carl-Olof Selenius. Utkom 2019 på www.lulu.com

En berättelse om en tvåårig pojke, som under en sandstorm i öknen kom bort från familjen. Under 10 år levde han med strutsar, innan han hittades och återfördes till familjen. En osannolik berättelse, som till författarinns

förvåning visade sig sann. Att återanpassa sig till människors levnadsvanor tog sin tid.



Ĥodapro – en tarda sorpotempo de **Folke Wedlin**. ISBN 978-91-85288-42-7.

Esperantoförlaget Eldona Societo Esperanto Utkom 2014.

1991 fann ett tyskt par en död kropp i glaciärområdet Ötztal i Italien vid gränsen till Österrike. Kroppen hade legat infrusen sedan 3000-talet f.Kr. Författaren har skrivit ett poem om hur livet kan ha gestaltat sig för Ĥodapro och om hans kärlek till en annan man. Boken vann 2009 års litterära poesipris i en tävling anordnad av UEA (Universala Esperanto-Asocio).



Ĉiuj steloj etas nokte av olika författare. Förlag: Mondial 2021, ISBN 9781595694201.


Mikronoveller och andra mikroberättelser skrivna direkt på esperanto. Kortaste berättelsen är på två

rader, Medellängd ca 15 rader. En del av berättelserna kan ändå innehålla ett helt livsöde.



Mi inventas la mondon de **Wislawa Szymborska**, som fick nobelpriset i litteratur 1996. Två olika ISBN anges. Troligen gäller denna för esperantoversionen: ISBN 978-83-907561-3-4.

Flera olika personer har översatt dikterna från polska till esperanto och 2015 kom diktsamlingen ut på esperanto.



La alkemisto de **Paulo Coelho**. På portugisiska (Brasilien) 1988, på esperanto 2007. Förlag, Gevap – Gráfica Editora Vale de Paralba Lida. Böcker från Brasilien verkar inte ha några ISBN-nummer.

En ung fåraherde bodde i Spanien. En natt drömde han att hans livs skatt fanns vid pyramiderna i Egypten. Under vandringen till Egypten lärde han sig mycket om det fysiska livet, men också en del om det andliga.



La fotoalbumo av **Trevor Steele**, första volumen. Utgiven av Internationella Esperantomuseet i Wien 2001.

Familjedrama som utspelar sig under tiden 1939- 1965.

Familjen O'Shea i Queensland, Australien har sju barn. Mamman är en konservativ katolik, pappan tar avstånd från "alla dumheter, som präster i kvinnokläder hittar på". Barnen påverkas av båda och deras tankar under vuxenblivandet är intressanta att följa, när de så småningom finner sina egna vägar. Hur det går får man dock inte veta, innan man har läst den följande volymerna, som kom 2005.



Paradizo ŝtelita av **Trevor Steele**, 336 sidor utkom 2012, ISBN 978-90-77066-49-2. Den har senare publicerats på engelska som Paradise stolen

Boken handlar om relationerna mellan Australiens ursprungsbefolkning och icke-ursprungsbefolkning.

Samma tema finns i **Flugi kun kakatuoj** (2010) – publicerad på engelska som *Soaring with cockatoos* (2012) och på franska som *Comme un vol d'oiseaux sacrés* (2013).


Trevor Steeles självbiografi, **Konvinka kamuflaĵo** ("Övertygande kamouflage"), publicerades 2014.

Med undantag för *Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen*, ursprungligen skriven på engelska som "No butterflies in Bergen-Belsen", skrevs alla hans publicerade böcker ursprungligen på esperanto, varefter han översatte dem för eventuell publicering på engelska. Han berättade en gång att medan hans



esperantoböcker sålde stadigt och hittade en färdig förläggare, hade han många fler svårigheter att marknadsföra sina engelska verk.

Promenado en Hirosima, la urbo de monumentoj, Hirosima E-Societo. Eldonis: Hirosima E-Societo, 2021, ISBN: 978 4947691378.




Anna de Verdaj Gabloj, av **L.M. Montgomery**. Eldonis: Mondial, 2022

På svenska: Anne på Grönkulla, en klassisk ungdomsbok – nu på esperanto.

Lunkato kaj mi av **Lydia Corry**. Utgiven av EAB, Barlaston 2022, ISBN: 9780902756533

Månkatten hjälper en liten flicka att flytta.



Kanada verkaro, La. Utgiven av: FriesenPress, 2022.



Njuk, Somero ĉe marmotoj, **Bernard Primault**. Utgiven av: Allsprachendienst Esperanto, 2022.



Raportoj el Japanio 25, **Jasuo Hori**. Utgiven av: Horizonte, 2021-2022.

Historia, politik.



Legendoj el Madagaskaro. Utgiven av: Fonto, 2022.




Esperantio vivas, **Tihomir Lovriĉ**, **Nicolas Vanof**. Utgiven av: Esperanta Civito, LF-koop, 2022.

La malamiko de Putin – Aleksej Navalnij kaj liaj apogantoj av **Kalle Kniivilä** 2021.


Förläggare: Mondial (26 juni 2021). Språk: Esperanto. Pocketbok: 160 sidor, ISBN-10: 1595694226, ISBN-13: 978-1595694225.





Morto de artisto av **Anna Löwenstein**, utkom 2008, ISBN: 978-90-77066-39-3.

Prokulpio, är en ung artist, bara en slav, då han möter kejsar Nero på en fest. De blir vänner, då de båda är intresserade av teater och konst. Men det är inte alltid lätt att vara en kejsares vän.



Marina av **Sten Johansson**, utkom 2013 och fortsättningen **Marina ĉe la limo** kom 2018. ISBN-10:


1595692711, ISBN-13: 978-1595692719 resp. ISBN 9781595693723.

Vi får följa Marina från barndomen till vuxen ålder, då hon tillsammans med en dansk kvinna adopterar två sydamerikanska barn.

Många av böckerna finns att köpa hos **UEA – Universala Esperanto-Asocio**, libroservo@co.uea.org


Listan ska sändas till Stadsbiblioteket.

*) Se en längre presentation av boken nedan.



Roberto Poort estas la administranto de E-librejo en Facebook

Li prezentas novajn librojn en kaj pri Esperanto. Jen kelkaj (liaj vortoj):



Esperanto – Lingua Franca and Language Community (Esperanto – interlingvo kaj lingva komunumo) estas libere elŝutebla libro de **Sabine Fiedler** kaj **Cyril Robert Brosch**. (General Editor: Humphrey Tonkin, University of Hartford, 2022).

Anglalingva libro, kiu povas konvinki profesion lingviston, ke estas fruktodone kaj interese esplori Esperanton kaj precipe ĝian uzon per la ordinaraj lingvistikaj metodoj uzataj por la studo de la tiel nomataj naturaj lingvoj. Tion konstatas en sia recenzo Jouko Lindstedt. Sed la libro evidente estas interesa ankaŭ por esperantistoj. (Libera Folio) <https://libro.ee/book.php?id=1752>

Fremdulo sur la tero

Nun en plibonigita formato danke al Ralph Dumain! (autodidactproject)

Fremdulo sur la tero estas libere elŝutebla rakonteto de **Marjorie Boulton**.

Kelkaj kortuŝaj fragmentoj el la vivo de Paŭlo, sepjara knabeto, kiu tute ne komprenas la strangan mondon de plenaĝuloj...

<https://libro.ee/book.php?id=1695>



Zulejka malfermas la okulojn de **Guzel Jaĥina**


Zulejka malfermas la okulojn estas premiita romano de tataro aŭtorino Guzel Jaĥina, bazita sur rakontoj kaj rememoroj pri la dekulakiga periodo en Sovet-Unio. Tradukita en Esperanton de T. Chmielik (2022).

<https://libro.ee/book.php?id=1749>

Jaĥina kontraŭis la invadon de Rusio en Ukrainion deklarante, ke "Kredo je paco estis neforigebla parto de la sovetia infanaĝo, ensorbigante tiun kredon je la identeco de ĉiu el ni. Tiu kredo ŝajnis neŝancelebla, kvazaŭ ĝi daŭrus ĝis la fino de la tempo. La novaĵoj la 24-an de februaro 2022 disbatis min. Mia mondo ne estis renversita, ĝi estis simple detruita", kaj aldonis: "Ĉi tio ne estas mia milito. Mi rifuzas konsideri ĝin la mian."

La aŭtorino naskiĝis en 1977 en Kazano, estas rusia verkistino kaj scenaristino. Ŝi kreskis en tradicia tataro familio, kaj la rusan lingvon lernis nur en la malfrua infanaĝo, kiam ŝi komencis frekventi la elementan lernejon. Ŝi studis kaj diplomiĝis ĉe la Kazana ŝtata pedagogia instituto, en la fakultato de fremdlingvoj, kaj poste laboris kiel fakulino pri reklamo kaj merkato. En 1999 ŝi transloĝiĝis al Moskvo, kie ŝi daŭrigis la studojn en la scenara fakultato ĉe la Moskva Filma Altlernejo. Ŝi loĝas en Moskvo ĝis nun.

Siajn unuajn rakontojn ŝi publikigis en la revuoj Нева (Nevo) kaj Октябрь (Oktobro). En la revuo Сибирские огни (Siberiaj Fajroj) aperis fragmentoj de ŝia debuta romano



Zulejka malfermas la okulojn (Зулейха открывает глаза). Ili vekis grandan intereson ĉe la legantoj, sed la aŭtorino longe ne povis trovi eldonejon. Post la hazarda renkontiĝo kun la estrino kaj posedantino de la literatura agentejo Elkost – Jelena Kostjukoviĉ – la romano ekvidis la tagan lumon kaj tuj fariĝis unu el la plej sukcesaj debutaj verkoj de la rusa kaj monda literaturoj en la lastaj jaroj. Depost la premiero en 2015 ĝi vendiĝis en 120 mil ekzempleroj. La aŭtorino ricevis tre prestiĝajn premiojn: Bolŝaja Kniga kaj Jasnaja Poljana "Lev Tolstoj". En 2021 Jegor Anaŝkin reĝisoris la filmserion sub la sama titolo. La romano estis tradukita en multajn lingvojn.

Komento de Elżbieta Karczewska, Pollando:


Mi legis antaŭ kelkaj jaroj la libron en la pola lingvo kaj mi ploris. Same mi ploris en la "Muzeo omaĝe al viktimoj de Siberio" en Bjalistoko aŭskultante rakonton pri sortoj de poloj senditaj la Malproksiman Orienton fare de rusoj dum jarcentoj. Neniam plu milito inter ni!

La pirata insulo de Julian Modest

La pirata insulo estas infanlibro (2022) de Julian Modest, bele ilustrita de Anna Lobo de Carvalho, <https://libro.ee/book.php?id=1751>

Ĉu ie ekzistas pirata insulo, stranga pirata ŝipo, kuraĝa fiŝkaptisto kaj bela knabino, kiu

havas la neordinaran nomon Olivia? Jes, ili ekzistas en la fabelo de Julian Modest. La talenta Esperanto-verkisto alloge rakontas la mirindan historion de la Pirata Insulo, per kiu li enkondukas la infanojn en la miraklan



La granda aventuro


La granda aventuro estas libere elŝutebla novelaro (1989) de la hungara verkisto Ferenc Szilágyi (1895–1967).

<https://libro.ee/book.php?id=1755>

”La humoro de tiuj rakontoj – kelkfoje veraj, kelkfoje fantaziaj – estas varia: bonhumora, malgaja, satira, aŭ tragedia. Ankaŭ la vivo estas tia.” (Ferenc Szilágyi). Hungar-naskita Ferenc Szilágyi translokiĝis al Svedio en 1938. Lia ”Konversacia Esperanto-Kurso” estis uzata en Irano, Kanado, Svedio kaj en multaj aliaj landoj, ĉar Szilágyi uzis bildojn anstataŭ nacian lingvon por klarigi.

SZILÁGYI Ferenc, 1895–1967. Hungaro, poste sveda civitano. Naskiĝis en Budapeŝto. Doktoro pri juro, oficisto, verkisto, redaktoro, Esperanto-instruisto. Akademiano. Esperantisto de 1924. Kunlaboris en diversaj hungaraj gazetoj. Gvidis Esperanto-kursojn kaj aranĝis literaturajn vesperojn. De 1932

↳ mondon de la Esperanta literaturo kaj vekos ilian fantazion. Legante ”La Pirata Insulo” la infanoj kaj iliaj gepatroj travivos agrablan, neforgeseblan vojaĝon.



praktikis propran lumbildan instrumetodon, precipe en Svedio, kiu ekde 1938 iĝis lia nova loĝlando. Kunlaboranto de ”Hungara Heroldo” kaj aliaj gazetoj. Redaktoro de ”Literatura Mondo”. Ĉefredaktoro de ”Norda Prismo”. Redaktis ankaŭ kvin ”Rapsodiojn” (kolektojn de prozo kaj poezio, originala kaj tradukita 1943–1953). Kunlaboris al Hungara Antologio (1933), Enciklopedio de Esperanto (1933–34), Sveda Antologio (1934). Kunredaktis 33 rakontoj. Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA. Poemoj en Dekdu poetoj (1934).

John Ronald Reuel Tolkien

La Kunularo de l' Ringo



La Kunularo de l' Ringo estas la unua volumo (libro 1 & 2) kiu aperis en 1954 de La Mastro de l' Ringoj, romano de la angla verkisto J.R.R. Tolkien. Ĝin tradukis al Esperanto William Auld. Libere legebla en html-formato. Tiu ĉi volumo pluas per la dua, nome La Du Turegoj.

Ankaŭ libere legebla:

<https://eduinf.waw.pl/esp/lern/librejo/0177/index.php>

Fine, Esperanto-filmo proponita de Roberto Poort

Rigardu kreskantan liston de altkvalitaj filmoj en Esperanto en **libro.ee**:

<https://libro.ee?kat=filmoj>

Nova, altkvalita filmo en Esperanto!

<https://libro.ee/book.php?id=1792>

La Silka Vojo estas belega, mallonga dokumenta filmo en Esperanto.

Venu kun ni laŭ la Silka Vojo al malproksima Xinjiang. Dokumenta filmo realigita origine en Esperanto fare de Ma-Ga Filmoj. (Alessandra Madella kaj Maximiliano Garcia).



La strato de Tanja, Vivo en Rusio 1917–2017

Originala nefikcia rakonto en Esperanto verkita de **Kalle Kniivilä**.



La libro *La strato de Tanja* de 2017 estas verkita de Kalle Kniivilä. Ĝi enhavas 160 paĝojn. La eldonejo MONDIAL eldonis ĝin.

Nova librorondo komenciĝos en januaro kaj la elektita libro estas *La strato de Tanja*.

Enhavo: La stato de Tanja en Sankt-Peterburgo longas apenaŭ unu kaj duonan kilometrojn, sed ĉi tie oni povas trovi la tutan historion de Sovetio kaj la postsoveta Rusio. Tuta jarcento da ordinaraĵoj kun nekutimaj sortoj.

La strato de Tanja estas la kvara libro de Kalle Kniivilä, post *Homoj de Putin* (2014), *Krimeo estas nia* (2015) kaj *Idoj de la imperio* (2016). Li daŭre eldonas novajn librojn pri Rusio.

Se vi volas partopreni en la Libro-rondo, bv. aĉeti la libron kaj anonci vin al mi por ekhavi la ligilon. Ĉiun monaton ni legas kelkajn ĉapitrojn, kiujn ni diskutas la lastan dimanĉon de ĉiu monato. Fininte la libron ni diskutas la tutan libron kun Kalle Kniivilä. /Siv, siv.burell@gmail.com

Isaac Asimov, rus-usona verkisto, parto 2

de Roger Nilsson

Asimov: En "La Lasta Demando" la komputiloj iĝis pli kaj pli perfektaj. Ĉiu komputilo generis pli progresintan posteulon. En la fino, la komputilo fariĝis, tute laŭvorte, Dio. (31:35). Ĝi estas mia plej ŝatata rakonto el ĉiuj


rakontoj kiujn mi skribis. En "La Ducentjara Homo", kiu estis trioble pli longa, mi priskribis kiel komputilo paŝo post paŝo fariĝis io pli proksima: Homo.

La komputilo, kiu komenciĝis kiel robota cerbo, fariĝis pli kaj pli kiel homo laŭ aspekto kaj konduto. Mi ĉiam pensis, ke se la robotoj fariĝos pli homaj kaj la homo helpe de enplantaĵoj iĝas ĉiam pli robotsimila, ili povas renkontiĝi duonvoje! Kiam ni havas tian hibridan estaĵon, homoj povas finfine demandi, kia estas la diferenco inter roboto kaj homo. Persone, mi verŝajne argumentus, ke la vera respondo estas: Kiu zorgas? Progreso estas ĉio, kio permesas al la homaro prosperi. Kio igas la homaron formorti ne estas, laŭdifine, progreso.

Dum la historio, homoj ĉiam suspektis progreson kaj scion. Miaj libroj prezentas konfliktojn inter tiuj, kiuj estas tute pozitivaj, kaj tiuj, kiuj volas malakcepti ĉian novan teknologion. Eĉ en la rakonto de Adamo kaj Eva, la krimo estis manĝi la frukton de la arbo de scio. (Kaj en la rakonto de Kaino kaj Habel pri ĉasocieto kaj terkultura socio. *Noto de RN.*) Homoj ĉiam sentis, ke tro da scio estas malbona. Ĉiuj iloj povas esti danĝeraj. Fajro permesis al ni kuiri – kaj ekbruligi. La kompasoj permesis al ni navigi – kaj mortigis antaŭkolumbajn civilizaciojn. La medikamento savis milionojn da vivoj – kaj pligravigis la popolan eksplodon. Kaj nun ni havas la komputilojn! Ĉu ili faros la tutan laboron kaj lasos nin travintriri?

Aŭ ĉu ili liberigos nin de nehomaj taskoj kaj permesos al ni esti pli kreivaj? Resume: ĉiu periodo havas siajn sukcesojn, kiuj alportas kaj bonon kaj malbonon. La tempo, en kiu mi mem ŝatus vivi, estas dum la ora epoko de Ateno. Imagu sciante la grekan kaj aŭdi Eŝilon, Sofoklon kaj Eŭripidon kiam ili estas prezentitaj ĉe la premiero! Sed greka demokratio estis konstruita sur sklaveco. Relative malgranda procento de la populacio estis civitanoj. La plej multaj estis kamparanoj kaj sklavo sen aliro al edukado. Imagu reveni

por iom babili kun Sokrato kaj veni tien kiel sklavo! Huf! Kaj en la pasinteco oni ne havis antibiotikojn... Imagu ricevi apendiceton aŭ kavojn en la dentoj.



Sciencfikcio de la 1970-aj jaroj diferencas de tiu de la 1950-aj jaroj. La danĝero ne plu estis milita. La rakontoj ne plu temis pri interplaneda invado. Anstataŭe aperis nova danĝero: La ekologia danĝero. La estonteco estas mondo de troloĝateco, mondo de poluado, materiala senigo kaj interna malpaco. Hodiaŭaj junularoj vidas,

ke kelkaj el la aplikoj de scienco detruas la mondon, en kiu ni vivas. Poluado estas preskaŭ ekskluzive pro aplikoj de scienco. Kemia rubo, ellasgasoj, radioaktiveco de nukleaj reaktoroj. Aferoj tiaj!

Se la junuloj rimarkas, ke la sciencistoj ignoras ĉiujn nedeziratajn kromefikojn kaj diras, ke ĝi ne estas ilia problemoj, tiam la sciencistoj aperas kiel la fiuloj de la homaro. Sed ne estas. Ni atingis punkton en la historio, kie niaj eraroj havas tiom gravajn sekvojn, ke ili ne plu korekteblas. Por povi elekti la vojon al la estonteco, ni bezonas planon. Kiel aspektos la tero post 500 jaroj? Ĝi dependas de kio okazas ĝis la jaro 2000.

Se ĝis la jaro 2000 ni ne solvos la problemojn, kiujn ni alfrontas hodiaŭ, post 500 jaroj ni vidos teknologian civilizacion ruinigita. La loĝantaro estos sufiĉe malgranda. Homoj pene sin trenas. Novjorko estas la plej granda ruino en la historio. Se, aliflanke, ni sukcesas solvi la hodiaŭajn problemojn, ni povas vivi en utopia socio post 500 jaroj. La loĝantaro estas sufiĉe malgranda kaj ŝpariĝas je resursoj. Ni havas kolonion sur la luno kaj eble sur Marso, vojaĝas tra la sunsistemo kaj profitas de nekredeblaj teknologiaj progresoj!


Kiam ni retrorigardas al la nuntempo, ni demandas nin, kiel la homaro povis pluvivi. Ni

ne povas permesi elspezi rimedojn por senfinaj, sencelaj konfliktoj. Tutmonda kunlaboro necesas por solvi la problemojn, kiuj influas nin ĉiujn. Mi kredas je la scienca metodo kaj racio por kompreni la naturon. Scienco ne provizas absolutan veron. Ĝi estas maniero testi niajn ideojn. Ĝi estas mekanismo, maniero plibonigi scion pri la naturo. La freneza sciencisto ne ekzistas. Male, estas la esploristoj kiuj plej bone komprenas la danĝerojn de esplorado. La homaro farus bone aŭskulti ilin.

Ĉiuj problemoj, kiuj vere minacas nian transvivon, estas tutmondaj problemoj. Ili influas nin ĉiujn. La ozona tavolo malaperas por ni ĉiuj. Poluado en la oceanoj, atmosfero kaj subtera akvo de la mondo influas nin ĉiujn. La nura maniero mildigi aŭ solvi la problemojn kaj certigi ke ili ne fariĝu nia falo estas tutmonda kunlaboro. Nenio, kion Usono faras sole, povas influi la situacion tra la mondo. Kunlaboro inter ĉiuj landoj de la mondo estas bezonata. Internacia kunlaboro estas nepre necesa. Ni certe ne povas havi stabilan ekonomion kaj stabilan socion, se ĉio estas kaoso. En multaj landoj, la plugarbaro nun estas malbarita pro la bezono de fuelo kaj kamparo.

Mi ŝatus kredi je la estonteco de la homaro. Sed ni estas tiel stultaj kaj miopaj, ke mi scivolos, ĉu ni povas malfermi la okulojn al la ekstera mondo antaŭ ol ni pereos. Kaj kiam la robotoj estos sufiĉe inteligentaj por anstataŭigi nin, ili devus! Ofte okazis dum nia evoluo kaj la evoluo de vivo antaŭ tio, ke unu specio estis anstataŭigita per alia kiu estis pli efika ol la unua. Homo sapiens posedas neniun dian rajton esti mastro de la vojo. Se pli bona alternativo aperas, ĝi povas transpreni. Ni efektive tiom teruras konservante la naturon kaj la vivon en ĝi, ke ju pli frue ni estas anstataŭigitaj des pli bone por ĉiuj aliaj vivaĵoj!

Sciencfikcio ne parolas pri abstrakta ŝanĝo. Ĉiuj SF-rakontoj traktas iun ŝanĝon por vidi ĉu ĝi estas por bono aŭ por malbono. Ĝenerale, la ŝanĝoj estas pli malbonaj aŭ riske esti tiel. Ne ĉar la SF-verkistoj estas pesimistoj, ne ĉar ŝanĝo ĉiam estas malbona, sed ĉar ĝi kreas dramon. Sciencfikcio atentigas, ke estas ĉiaj ŝanĝoj kaj ke la homaro povas elekti kaj forĵeti. Gravus elekti tiujn, kiuj estas de bono kaj ne de malbono. Tio estas la ĝusta interpreto de la mesaĝo de SF.



Ĉu SF jam influis la mondon? Kaj Jules Verne kaj H.G. Wells skribis popularajn raportojn pri vojaĝoj al la luno kaj pavimis la vojon por kosmovojaĝoj... kaj la atombombo. Jes, foje SF realiĝas. Nuntempe, futurologio fariĝis grava elemento en politiko, nacia ekonomiko kaj la scienco de milito. SF-verkistoj estas rimarkitaj de ĉiuj, kiuj volas influi nian estontecon. Estas snobismo malestimi sciencfikcion kun respekto al la infanecaj Hollywood-variaĵoj. Ignori SF-on estus ignori aliancanon en la batalo kontraŭ la malamiko: La glorado de nescio kaj la disvastiĝo de pseŭdoscienco.

Ne ekzistas ununura, neevitebla estonteco, kiu estas gravurita en safiro en la arkivoj de la ĉielo kaj ke la homaro estas kondamnita vivi por eterne. Prefere, estas sennombraj eblaj estontecoj. Se ni volas plu vivi, ni devas kulturi "SF-pensadon". La vera valoro de SF estas permesi spekuladon kaj fari ĝin estiminda. La SF-verkistoj povas preterlasi aferojn, kiuj ankoraŭ ne estis kovritaj. Ili povas spekulativi

pli libere ol la sciencistoj kvankam ĝi povas ŝajni freneza. Mia amiko diris, ke SF-verkistoj agas kiel skoltoj senditaj de la homaro por sondi la estontecon: "Promese, se nur ni preterpasas obstaklon." Ni ne antaŭdiras, ne konscie, sed foje ni pravus. Ankaŭ al mi okazis tio, sed estas hazardo.

Kion ni faras antaŭ ĉio estas prilumi la homan ekzistadon pro certa ideologio, kiu diferencas de la reganta en nia socio. SF estas nur alia speco de literaturo. Ĉiu bona literaturo devus lumigi la ekziston. Kiel mi diris, mi ne plu estas ĉi tie kiam vi legas ĉi tion. Sed mi ne ĉagrenas, ke mi ne povas vidi iun ajn el la eblaj estontecoj. Kiel Hari Seldon dum la vivo iris al la fino, mi povas retrorigardi ĉion, kion

mi plenumis, kaj trovi konsolon. Mi studis, imagis kaj skribis pri multaj eblaj estontecoj kvazaŭ mi estus tie. Mia mesaĝo estas, ke scienco kaj nova teknologio, ĝuste aplikataj, povas solvi la problemojn, kiujn ni alfrontas hodiaŭ. Ili ankaŭ povas neniigi la homaron. Ĉi tio povas fariĝi la alvokiĝo de la junularo:

Akiri scion por influ la uzon de ĉi tiu teknologio. Tial, ni SF-verkistoj volas helpi ilin rigardi antaŭen. Ĉar la granda demando, kiun ni provas respondi ree kaj ree, estas: Kien ni iras? Kien ni iras. *Isaac Asimov*



*Isaac Asimov
(1920–1992).*

Respondoj al nia demando al la legantoj de Ora Ĵurnalo



- **Walter**, Vieno, Aŭstrio: Mi legas preskaŭ ĉion, sed precipe pri Svedio, ankaŭ la tekstojn en la sveda lingvo. Kelkajn artikolojn mi uzis kaj uzos por mia Esperantokurso en Vieno.
- **Renato**, Londono: Mi legas ĉiujn titolojn, meznombro 2 aŭ 3 artikolojn.
- **Ann-Louise**, Helsingborg: Mi legas elektitajn partojn, prefere ne tro longajn artikolojn.
- **Aino**, Gotenburgo: Mi legas la tuton.
- **Lasse**, Gunnilse: Unue mi legas la enhavtabelon, poste ĉiujn artikolojn pri naturo kaj tekniko kaj ankaŭ ĉiujn artikolojn de skribantoj, kiujn mi konas.
- **Monica**, Sävedalen: Mi ŝatas legi artikolojn pri lingvoj kaj libroj, sed ankaŭ aliajn tekstojn.
- **Magnus**, Gråbo: Kelkfoje mi legas la rubrikojn kaj kelkan artikolon.
- **Helena**, Gotenburgo: Mi legas *Ora Ĵurnalo* ĉefe por ekscii kio okazas en la klubo.
- **Margareta**, Gotenburgo: Mi legas multon, sed mi pensas ke estas tro da paĝoj.
- **Roger**, Gotenburgo: Dependas de kiom da tempo mi havas.
- **Jack**, Britio: Mi tre ŝatis la artikolon pri alkoj, ĉar alkoj ne troviĝas en mia lando.
- **Antoni** (kun esperanta nomo Anĉo) el Pollando: Mi regule legas vian revuon. Mi legas ĉion, de unua ĝis lasta paĝo. Mi ĉiam kun ekintereso legas ĉion, kaj mi trovas la enhavon ĉiam tre valora.
- **Ingegerd, Andreas, Birgitta, Inga, Nick, Siv...** Pli, malpli ni ja legas ĉion, ĉar ni ja faras la gazeton.

Koran dankon pro viaj respondoj!

/Siv